Ruĝa Ĉapeto

Por ĉi tiu fabelo estas uzata la tiparo Kasper, desegnita de Franko Luin. La kajero estas unu en serio de fabelkajeroj prezentantaj la tiparojn de la sama desegnisto. Ili estas elŝuteblaj ĉe www.omnibus.se/fabelaro.

© 2002 Omnibus Typografi

OMNIBUS TYPOGRAFI
BOX 135 · SE-135 23 TYRESÖ, SVEDIO · TEL. +46 8 742 83 36
franko@omnibus.se · www.omnibus.se

Estis iam vilaĝa knabineto, la plej ĉarma estaĵo, kiun oni iam vidis. Ŝia patrino tre fieris pri ŝi kaj ŝia avino eĉ pli. La bona virino kudris por ŝi malgrandan ruĝan ĉapon. Ĝi tiel bone taŭgis por la knabino, ke ĉiuj eknomis ŝin Ruĝa Ĉapeto.

Iun tagon ŝia patrino, kiu estis bakinta, diris al ŝi:

"Iru al avinjo kaj rigardu, kiel ŝi fartas, ĉar oni diris al mi, ke ŝi estas malsana; portu al ŝi kukon kaj kuveton da butero."

Ruĝa Ĉapeto tuj ekiris al sia avino, kiu loĝis en alia vilaĝo.

Dum ŝi promenis tra la arbaro, ŝi renkontis lupon, kiu emis manĝi ŝin, sed ne kuraĝis, ĉar kelkaj arbaristoj laboris en la proksimeco. Ĝi demandis ŝin, kien ŝi iras. La kompatinda infano, kiu ne sciis, ke estas danĝere halti kaj aŭskulti lupon, respondis:

"Mi iras viziti mian avinon kaj portas al ŝi kukon kaj kuveton da butero, kiujn sendas al ŝi mia patrino."

"Ĉu ŝi loĝas longe for?" demandis la lupo.

"Ho jes," diris Ruĝa Ĉapeto, "estas post la muelejo, kiun vi vidas tie sube, en la unua domo en la vilaĝo."

"Nu bone," diris la lupo, "mi iros kaj ankaŭ vizitos ŝin. Mi iros ĉi tiun vojon kaj vi tiun alian, kaj ni vidu, kiu estos tie pli rapide."

La lupo ekkuris laŭ sia pleja kapablo kaj laŭ la plej rapida vojo, dum la knabineto prenis la pli longan vojon kaj amuziĝis kolektante nuksojn, postkurante papiliojn kaj farante bukedojn el la floroj, kiujn ŝi trovis laŭvoje.

Post nelonge la lupo alvenis al la domo de la maljunulino. Ĝi frapis al la pordo: tok tok.

"Kiu estas tie?"

"Estas via nepino Ruĝa Ĉapeto," diris la lupo, kiu aligis sian voĉon, "kiu kunportas kukon kaj kuveton da butero, kiujn mia patrino sendas."

La bona avino, kiu kuŝis en la lito, ĉar ŝi iom malsanis, ekkriis:

"Premu la klinkon kaj la pordo malfermiĝos."

La lupo premis la klinkon kaj la pordo malfermiĝis. Ĝi tuj ĵetis sin sur la bonan virinon kaj englutis ŝin en unu gluto, ĉar ĝi jam de tri tagoj ne estis manĝinta. Poste ĝi fermis la pordon kaj kuŝiĝis en la lito de la avino, atendante Ruĝan Ĉapeton, kiu post ioma tempo alvenis kaj frapis al la pordo: tok tok.

"Kiu estas tie?"

Ruĝa Ĉapeto, aŭdante la krudan voĉon de la lupo, unue timiĝis, sed ŝi kredis, ke la avino malvarmumiĝis kaj tial estis raŭka; ŝi respondis:

"Estas via nepino Ruĝa Ĉapeto, kiu alportas al vi kukon kaj kuveton da butero, kiujn patrino sendas al vi."

La lupo ekkriiis, moligante iom sian voĉon:

"Premu la klinkon kaj la pordo malfermiĝos."

Ruĝa Ĉapeto premis la klinkon kaj la pordo malfermiĝis. La lupo, vidante ŝin eniri, kaŝis sin en la lito sub la litkovrilo kaj diris al ŝi:

"Metu la kukon kaj la kuveton kun butero sur la kamenon kaj venu kuŝi ĉe mi."

Ruĝa Ĉapeto forprenis la vestaĵojn kaj enlitiĝis. Ŝi estis tre surprizita, kiel la avino aspektas sen vestoj, kaj ŝi diris:

"Avinjo, kiel grandajn brakojn vi havas!"

"Tio estas, por ke mi pli bone ĉirkaŭbraku vin, knabinjo mia."

"Avinjo, kiel grandajn krurojn vi havas!"

"Tio estas, por ke mi pli bone kuru, infano mia."

"Avinjo, kiel grandajn orelojn vi havas!"

"Tio estas, por ke mi pli bone aŭdu vin, infano mia."

"Avinjo, kiel grandajn okulojn vi havas!"

"Tio estas, por ke mi pli bone vidu vin, infano mia."

"Avinjo, kiel grandajn dentojn vi havas!"

"Tio estas, por ke mi pli bone manĝu vin."

Dirinte tiujn vortojn la malica lupo ĵetis sin sur Ruĝan Ĉapeton kaj manĝis ŝin.

Moralo: Oni vidas ĉi tie, ke infanoj, speciale belaspektaj junulinoj, malbonfaras parolante kun fremduloj, kaj ke ne estas strange, se ili estas manĝitaj de la lupo. Mi diras "lupo", sed ne ĉiuj lupoj estas de la sama speco. Kelkaj estas ĉarmaj, kvietaj, ĝentilaj, senpretendaj, memfidaj kaj dolĉaj; ili postsekvas junajn virinojn en la hejmojn, kaj plien. Bedaŭrinde, tiuj ĝentilaj lupoj estas la plej danĝeraj el ĉiuj.

OMNIBUS 02.99.531

Fabelo el la kolekto de Charles Perrault:
Contes de ma mère l'Oye (Parizo, 1697).
Iom libere tradukis Magda Melnik

Omnibus